



## PILO-PRESS

Internacia  
Informservo

N-ro 19/1974 29 maj 1974  
Aperas ĉiusemajne

### La libro de la semajno

Dr. Werner Bormann:

Die Einigung  
Europas und ihr  
Sprachenproblem

Prezo 3,-- GM

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pöckel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

### 26-a Internacia IFEF-Kongreso

Tarragona (pp-ekr) De la 11-a ĝis la 17-a de majo 1974 okazis la 26-a Kongreso de la Internacia Fervojoista Esperanto-Federacio en Tarragona (Hispanujo). Partoprenis 648 personoj el 17 landoj. La kongreso staris sub la aŭspicio de FISAIC (Internacia Federacio de kulturflgantaj fervojistoj), kiu prezentigis en la persono de s-ro Gilles (Belgujo). Kiel kongresejo funkciis paradize situanta restadejo sindikata, konsistanta el bonege taŭgaj ejoj kaj daŭoj da bungalaoj en kiuj povis loĝi la kongresanoj.

Krom kutima interkona vespero okazis ekumena diservo, solena inaŭguro kun ĉeesto de eminentaj reprezentantoj de la fervojo, sindikato, komunumo, provinco kaj UEA, akcepto flanke de la urbestro de Tarragona, 1 kunsido de estraro/LKK, 3 laborkunsidoj de komitato/estraro, faka prelego pri la renovigo de la hispanaj fervojoj kun filmo, po unu laborkunsido de la Terminara kaj Fakprelega Komisionoj kaj de la Junulara Sekcio.

Dum bankedo la oficiala reprezentanto de FISAIC distingis la longjaran estraranon de IFEF, la svisan kolegon Otto Walder pro liaj meritoj en internacia medio per la ora medalo de FISAIC. Novelektigis la IFEF-estraro, el kiu demisiis la kasisto Otto Walder kaj la redaktoro Per Johan Krogstie. Estis reelektitaj la prezidanto, Joachim Giessner (FRG), Vicprezidanto Wim van Leeuwen (Nederlando), Sekretariino Elfriede Kruse (FRG), nove elektitaj kiel kasisto Henning Hauge (Danlando) kaj kiel redaktoro Guy Delaquaize (Francujo). Same novelektitaj estis gvidantino de la Junulara Sekcio, nome f-ino Mirella Merlani (Italujo) kaj la sekretarioj de la Terminara kaj Fakprelega Komisionoj, s-ro J. Ladjević (Jugoslavio) resp. Otto Rösemann (Germanujo). Unuanime la komitato decidis pri rezolucio direktenda al la fervojaj kompanioj kaj sindikatoj.

Kiel pluaĵ oficialaj aranĝoj okazis:

- la inaŭguro de nove konstruita domo kiu konsiderinde pligrandigas la Esperanto-muzeon en Sant Pau d'Ordal kun posta regalo flanke de la komunumo;
- vizito al ekspozicio de malnovaj vaporlokomotivoj en Villanueva y Geltru kun regalo flanke de la komunumo;
- akcepto kunregalo ĉe direktoro de la kongresejo;
- forumo kiel nove enkondukita programero. En ĝi povis esti starigitaj demandoj pri fervojaj kaj fervojistaj problemoj, sed ankaŭ pri aliaj;
- futbalmatĉo, kiun perdis la IFEF-teamo 0:3 kontraŭ loka teamo.

Antaŭ kaj dum la kongreso la gazetaro, Radio kaj Televido estis vaste informitaj. Sekvo estis longaj artikoloj kun bildoj, radio-kaj televida elsendoj. Mil afiŝoj pendis ne nur en multaj stacioj de la fervojo sed ankaŭ en sennombraj restoracioj kaj aliloke en Tarragona.

(Daŭrigo sur p. 2)

### IFEF-kongreso (daŭrigo)

Aliaj ekskursoj kondukis la kongresanojn al la belege situanta duoninsulo Penniskola kaj al la fama hispana sanktejo Montserrat.

Ankaŭ laŭ kultura vidpunkto la kongreso havis diversajn kulminojn, kaj nome en formo de

- folkloro vespero sub libera ĉielo sur la ĉefplaco de la urbo. Disponigis ĝin tute senkoste la urbo Tarragona,
- teatra vespero, en kiu tri artistoj de la Bulgara Esperanto-Teatro, Sofio, Belka Beleva, Anani Anev kaj Mihaial Cabanov, ludis la komedion "La Rozoj" de A. de Benedetti.

Kompreneble okazis ankaŭ internacia bale.

Postkongreso havis lokon por 3 tagoj en Callela norde de Barcelona.

Ne pre menciindas, ke la hispana fervojo RENFE senpage disponigis specialajn trajnojn por la alvenintaj kongresanoj de la landlimo (Port Bou) ĝis Tarragona kaj por la forveturantoj kaj postkongresantoj de Tarragona ĝis Barcelona, same kiel ĝi konsiderinde helpis al LKK diversmaniere.

\*\*\*\*\*

### Aŭstria-Bulgara Vespero en Vieno

Vieno (K.B./pp) Unu monaton post la memorinda Zamenhof-memorsoleno, per kiu la nova legejo de la Pola Instituto en Vieno estis inaŭgurita, sekvis ne malpli bone sukcesinta vespero, la 18-an de majo 1974, en la Bulgara Kulturdomo. La sukceso rezultis antaŭ ĉio el la grandioza vervo, per kiu la lertega pianistino Ananeta Ŝivaĉeva kaj la admirinda violinisto Nikolai Nanĉev prezentis klasikan kaj modernan muzikon. Ĝi rezultis ankaŭ el la koreco de la vortoj, per kiuj d-ro Nikola Nedeff, ĝenerala sekretario de la Aŭstria-Bulgara Asocio, kaj s-ro Peter Germanov, direktoro de la Kulturdomo, salutis - la laste nomita esperantlingve! - la vigle aplaudemajn, malgraŭ la forloga serena semajnfino preskaŭ surprize multnombrajn gastojn - inter ili s-ron Nikola Nikoloff, konsilisto de la Bulgara Ambasado.

Koreco esprimiĝis ankaŭ en la malavare aplaŭditaj vortoj pri kaj de Zamenhof, per kiuj s-ano Emil Vokal havigis etike spiritan fokuson al tiu aranĝo, kies interamikigan karakteron kiel komuna entrepreno de la Aŭstria-Bulgara Asocio, Aŭstria Esperantista Federacio kaj Societo por Internacia Kompreno - Amikoj de Esperanto senatkonsilisto d-ro Leopold Grimme, prezidanto de la Aŭstria Esperantista Federacio, konvinke substrekis.

Koktelo kun bulgaraj specialaĵoj - laŭ merito evidente bonvenaj - kaj altkvalitaj kolorfilmoj pri la bela lando, kiu ilin liveras, finis la jam tradician, dankindan kultur-vesperon.



\*\*\*\*\*

### Brita Parlamenta Grupo kreskis

London (BEA) Post la nacia baloto en Britujo, en kiu kampanjis anoj de Brita Esperanto-Asocio por varbi subtenon al Esperanto, la Esperanta Parlamenta Grupo kreskis de 31 al 44 parlamentanoj. La Parlamenta Grupo nun pritraktas: Ekzamenojn pri Esperanto, reprezentigon en la Hamburga Universala Esperanto-Kongreso kaj eventualan delegacion al la ministro pri edukado.

# Postkarte spannte den Bogen von Vergangenheit zur Zukunft

Geschichtliches von der internationalen Sprache Esperanto



Herzberg. (pp) Sub la titolo "Poŝtkarto streĉas la arkon de pasinteco al estonto - Historiaĵo de la internacia lingvo Esperanto" (Vidu supre!) aperis interesa ampleksa artikolo en "Harzkurier", gazeto de Herzberg (Harc-montaro) plume de Joachim Giessner, prezidanto de IFEF kaj GEFA. La artikolon, kiu priskribas la ekeston kaj nunan situacion de Esperanto, iniciatis retrovita poŝtkarto de L. Zamenhof skribita al W. H. Trompeter en Schalke la 12 marto 1895. Estas interese, ke la poŝtkarto estis transsendita al s-ro Giessner de neesperantisto post la pasintjara jarkunveno de GEFA en Koblenz. La poŝtkarto provokas ankaŭ admiron al la tiama poŝta servo: Dum du tagoj ĝi atingis de Grodno en Ruslando la germanan lokon Schalke, kiel oni povas konstati el la stampoj. Tio nuntempe preskaŭ ne plu eblas - malgraŭ la 'onidiraj' progresoj en niaj trafik-sistemoj!

La poŝtkarto tekstas:  
"L. Zamenhof

Grodno, 28.II. 12.III.95

Kara amiko! Mi baldaŭ bezonas ĉirkaŭ 100 ekzemplerojn de la verko No 52 (de Geogeghan), tial mi petas vin, volu min sciigi, ĉu Tümmel retrovis la perditajn stereotipojn de tiu ĉi verko kaj ĉu ne estus eble presi novan eldonon de tiu ĉi verko?  
Kun plej kora saluto Via L. Zamenhof

P.S. Mi petas vin ankaŭ, volu alsendi al mi 50 ekzemplerojn de No 43 kaj 25 ekzempl. de No 53, kaj volu min sciigi kiom vi kalkulas al mi por ili, por ke mi povu scii ĝis kia alteco mi povas doni rabaton al la aĉetantoj. L. Zam "

\*\*\*\*\*

Esperantistoj ĉe FDP-komisiono

Paderborn (hb) De la 24 - 26 maj 74 Prof. D-ro Frank, Prof. Boeckmann, D-ro H.M. Maitzen kaj Hermann Behrmann partoprenis kladzuron

kunvenon de la FDP-komisiono de parlamentanoj en Theodor-Heuss-Akademio en Gummersbach por prepari decidojn i.a. pri teknologipolitiko (kio inkluzivas ankaŭ la estontan lingvopolitikan koncepton).

### Lernejestraj konferencoj

Paderborn (hb) La 17 kaj 20 majo 1974 okazis du konferencoj de la lernejestroj en la distrikto Paderborn rilate la lernejan eksperimenton. La 10 de junio komenciĝos nova preparkurso por instruistoj laŭ instigo de la lerneja inspektorino.

### Preparkunvenon en Bissingen

Bissingen (abk) Tini Putto, sekretario de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI), kaj Jan van Keulen, redaktoro de ties revuo "Dia Regno", ambaŭ el Nederlando, konferencis antaŭ kelka tempo en Bissingen an der Teck kun la KELI-prezidanto, pastoro Burkhardt, ĉefe por prepari la trian komunan kongreson de KELI kaj IKUE en Hamburg-Langenhorn dum la semajno antaŭ la Universala Kongreso. Ili partoprenis ankaŭ en pluraj aranĝoj de la loka eklezio kaj vekis viglan intereson por Esperanto. Pluraj junuloj esprimis la deziron lerni la lingvon.

### Negativa elpaŝo en Televido

Laŭ informo de Oliver Walz, Zweibrücken, maljuna usonano - dum televida elsendo kadre de la programo "Wer dreimal lügt" (Kiu trifoje mensogas) merkrede, 22 maj 74 - diris ke ŝia internacia lingvo de signoj (por surd-mutuloj) estus multe pli taŭga kaj valora ol Esperanto, ke ja Esperanto, tiu tielnomita internacia lingvo nur estis utopio, kiu neniam havis kaj neniam havos eĉ nur malgrandegan sukceson ktp. Najbaroj kaj konatuloj informis Oliver Walz telefone pri tiu negativa rilato al Esperanto. Laŭ Oliver Walz estus bone se esperantistoj protestu kontraŭ tiu misprezento kaj donu pozitivajn reagojn. Oni skribu al Südfunk, Fernsehen, "Wer dreimal lügt", 7 Stuttgart 1, Postfach 3003.

### Esperanto en la radio

Varsovio. La ĉi-semajna Esperanto-ekspreso alportis multajn informojn el Pollando, el la pola Esperanto-movado. Ne mankis la kutima rubriko "Niaj aŭskultantoj sciigas" kaj Jerzy Grum prezentis unu el la multaj Esperanto-problemoj. Antaŭ la mikrofono estis ankaŭ du mikrofonaĵoj gastoj, unu el Helsinko, kiu rakontis pri siaj impresoj pri polaj lokoj kaj speciale pri Varsovio, kaj Roger Bernard, kiu raportis pri la "Akademio de Esperanto". Inter la unuopaj programeroj aŭdiĝis Esperanto-kanzonoj, i.a. pri la Varŝavaj knabinoj. Pro tio oni anoncis ĉi-foje la E-ekspreson "vort-muzika elsendo". Ĉu la dimanĉ-vespera disaŭdigo de la E-Ekspreso je la 22,30 h alogis jam novajn aŭskultantojn? Aŭ ĉu eble kelkaj sopiras pri la dimanĉ-posttagmeza ekspreso? Tion certe la redakcio ŝatas scii! Skribu do vian opinion al Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.O.B. 46, PL-00-950 Varsovio 1.

Vieno. La dimanĉ-matena elsendo el Vieno ĉi-foje estis tre klare aŭdebla, sed mi ne povis sekvi ĝin, ĉar mi vekis tro malfrue. Tamen ella leterkesto mi aŭdiĝis pri la bona kunlaboro inter Varsovio kaj Vieno.

Romo. Post longa tempo mi kaptis denove la E-Kurieron de Radio Romo je 41 m. Oni disaŭdiĝis la Bonvolmesaĝon el Kimrujo kaj recenzon pri la komputila vortaro el Hungario kaj informojn el la itala E-movado.

Zagrebo. En sia dua parto Zagrebo raportis pri kunveno de Jugoslavio E-junularo en Maribor. Bern. D-ro A. Baur prelegis pri la svisa flugkompanio "Swiss-Air"-.